BOLINDER-MUNKTELL

AKTIEBOLAGET BOLINDER-MUNKTELL · ESKILSTUNA SWEDEN

FILIALEN, - SANDTORGET 1, - SKÖVDE. - TEL. 373

VERKSTÄDERNA GRUNDADE 1832

DOTTERBOLAG:
J. & C. G. BOLINDERS MEK. VERKST. AB.
KTELLS MEK. VERKSTADS AB.
E... BERONIUS MEK. VERKSTADS AB.
AKTIEBOLAGET AVANCEMOTOR

A. B. C. CODE 5TH & 6TH ED.
LIEBERS CODE · BENTLEY'S CODE
BENTLEY'S SECOND · MARCONI
WESTERN UNION · RUD. MOSSE
PRIVATE CODE

SKÖVDE DEN 19.6.1945.
(POSTFACK 113)

Sinjoro Jan Strönne
Amiralsgatan 36,
M a l m ö.

EDER REF.
VÅR „

Kara amiko,

Dankon pro via pkarto. Jes, mi kontaktiĝas kun la gepatroj de Craemborn tie ĉi en Skövde. Sekve mi esperas retrovi lin kaj laborigi lin pri la afiŝoj. Bv sendi al mi la du skizojn pri afiŝoj, do terglobo-tri bildoj kaj flugmaŝino-ĉefurboj, kondiĉe ke vi samopinias pri ilia taŭgeco ĉi-aŭtune. Mi poste revenos.

Mi plene konsentas je la lasta propono pri dankletero/diplomo. Bv sendi al mi specimenon, kiam ili estas pretaj.

El amiko Oskar Svantesson mi ricevis leteron, kiun mi aldonas por via kono. Se liaj klopodoj sukcesus, estus en si mem tre bone. Sed mi ne scias, ĉu li povus fariĝi idealaj redaktoroj? Tamen estus bone, se redakcio en Gbg povus laborigi stabon de kunlaborantoj tie. Fakte tio povus signifi paŝon al renovigo de la E-laboro en Gbg, kie oni ĝis nun montris tro da lacemo. Je la resendo de la ald. letero, bv diri vian opinion.

Se vi havos horeton je dispono, mi petas vin resume respondi al mia letero de la 15.6. Precipe la punktojn "Barometer" kaj "Tidningsartiklar" mi petas vin atenti.

La protokolon de la FK-kunveno 14.6. mi ricevis. Pri § 6 mi certagrade samopinias, se ni turnos nin al la ĉefaj, regnaj federacioj diversspecaj /Förbund/; la lokajn societojn/organizojn ni ja atakos pere de Amikaro de E. Tamen ioma singardeco devas esti atentata rilate al la "atako" kontraŭ la grandaj federacioj. Multe dependas de la formo, en kiu ni alskribas ilin. Mi revenos al tiu afero.

Inter la tagoj 7 - 22 de julio mi libertempos kaj sekve ne estas atingebla letere. La lastajn tagojn mi estos en Sthlmo.

Hodiaŭ vespere kluba- kaj junulargrupa kunvenoj en Skövde. Cetere nenio nova.

Kore salutas

Leonard Nilsson

Pri la grandeco de la afiŝoj mi proponas t.n. "halvark", t.e. 70 x 50 cm. ĈuY

Vi fritaga oss från allt ansvar på grund av hinder genom eldsvåda, olyckshändelse, mobilisering, krig, strejk, lockout, politiska oroligheter, trafikrubbningar, utebliven eller försenad leverans av materialier eller råvara eller andra förhållanden, likviltigt av vilken art, som ligga utom vår kontroll (force majeure), men vilka kunna hava inflytande på driften i